I. F. E. A.

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI
Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I. F. E. F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F. E. I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italujo)

# Informa Bulteno

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071 REDAKTORO: Gimelli p. i. Germano

N° 11 - 12 Novembro kaj Decembro 1958 8-a Jaro

## COMUNICATO IMPORTANTE

Le Associazioni di cui siamo aderenti, e cioè; INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTFERVOJISTA (I.F.E.F.) in Amsterdam; UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO (U.E.A.) in Rotterdam; FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F.E.I.) in Torino, ci hanno chiesto gli elenchi dei Soci ed i relativi importi delle quote, per cui preghiamo i nostri Soci di trasmettere con ogni urgenza le quote oppure farci avere leLoro dimissioni, onde non essere costretti a pagare anche per chi non intende aderire alla nostra Associazione.

Chi riceve il presente bollettino, e non ha interesse al movimento Esperantista e non intende ricevere ulteriormente il bollettino stesso è pregato di farlo presente alla redazione , Via Donato Creti, 61 Bologna.

## BONDEZIROJ

EN OKAZO DE LA PROKSIMAJ FESTOJ, KUN VARMA KORO, LA ESTRARO DE ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO KAJ LA REDAKCIO DE "INFORMA BULTENO", FRATE DEZIRAS FELIĈAN KRISTNASKON KAJ PROSPERAN NOVJARON AL ĈIUJ ANOJ KAJ SIMPATIANTOJ DE NIA ASOCIO.

NI SENDAS KORAJN BONDEZIROJN ANKAŬ AL LA ESTRARO DE INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA KAJ AL LA TUTA ANARO KAJ LEGANTARO EN ĈIUJ LANDOJ.

## 11-a I.F.E.F.-KONGRESO - Linz (Aŭstrujo), 9-a ĝis 14-a de majo 1959

Protektoro: Dipl. Inĝ. Karl Waldbrunner, ministro pri trafiko kaj elektraj afer.
Honorkomitato: Ministro DipL. Inĝ. D-ro Juris. Mag. Docento Hans Frenzel, Prezidanto de Kalkulkontrolejo, Honora Prezidanto de A.E.F. Ministro em. Vinzens Übeleis, Prezidanto Österr. Verkehrswerburg.
D-ro Heinrich Gleissner, Landestro de Liglando Oberösterreich.
Fransz Jonas, land- kaj urbestro de Wien, Deputito al Nationalrat.
D-ro Ernst Koref, Urbestro de Linz, Deputito al Bundesrat.
Deputito al Nationalrat Richard Freund, Estro de la Fervojista Sindikato Aŭst.
Kort. Kons. D-ro Maximilan Schantl, Ĝeneraldirektoro de Aŭstria Fervojaro.
Kort. Kons. D-ro Walther Sandig, Ĝeneralsekretario de Aŭstria Fervojaro.
Kort. Kons. D-ro Leopold Kassecker, Prezidanto de la Direkcio Linz.
Kort. Kons. Dipl. Inĝ. Carl Stolz, Prezidanto de la Direkcio Wien.
Kort. Kons. Dipl. Inĝ. Josef Dultinger, Prezidanto de la Direkcio Innsbruck.
Kort. Kons. D-ro Karl Gradischnigg, Prezidanto de la Direkcio Villac.
Direkcia Kons. Dipl. Inĝ. Friedrich Klose, Vicprezidanto de la Direkcio Linz.
Kort. Kons. Hugo Steiner, Direktoro de la Inter. E-Muzeo en Wien; Honora Prezidanto de A.F.E.F.

Direkcia Kons. D-ro Karl Kaiser, Estro de Kulturkomitato de Aùstriaj fervojistoj Franz Harringer, Vicprezidanto de la Laborista Ĉambro Linz kaj Estro de la Fervojista Sindikato, regiono Linz.
D-ro Hellmut Tursky, Direktoro de Fremdultrafikoficejo Linz, Magistrata Kons.
Efektiva Oficejkonsilisto en la Ministerio por I.A. Rajmund Cech, Prez. de A.E.F.
LOka Kongresa Komitato (L.K.K.): Adreso: Linz/Danubio, Bahnhofstrasse 3, Aùstrio.
Afergvidanta Prezidanto: Dipl. Inĝ. Fritz Tschom - Vicprezidanto: Hans Bürger - Sekretario: Louis Angermayer - Helpsekretario: Johann Geroldinger
Kasisto: Walter Ulrich - Loĝado kaj manĝado: Max Hollinger.
Kongresejo: Kaufmännisches Vereinshaus, Linz/Danubio, Landstrasse 49, Aùstrio

KONGRESA PROGRAMO

Sabato 9/5 - 8 h. Malfermo de la kongresejo; 14 h. Kunveno de la I.F.E.F.-estraro kaj L.K.K. - 15-h. Kunveno de la I.F.E.F.-estraro kaj la landaj delegitoj; 20 h. Interkonatiĝa vespero.
Dimanĉo 10/5 - 9 h. Solena Malfermo de la kongreso; 15 h. Urba rondveturado, komuna fotografado, poste libera vespero.
Lundo 11/5 - 9 h. Unua laborkunsido; 9,30 h. Fabrikekskurso por virinoj; 14 h. Dua laborkunsido; 20 h. Kultura vespero.
Mardo 12/5 - 9 h. Kunveno de la redaktora komitato; 10 h. Kunveno de la terminara komitato; 9,30 h. Fabrikekskurso por virinoj; 14 h. Tria laborkunsido; 20 h. Internacia balo.
Merkredo 13/5 - 8,30 h. Ekskurso; 15 h. Fakprelegoj; 20 h. Filmvespero.
Ĵaùdo 14/5 - Tuttaga ekskurso per ekstra trajno kun folklora vespero en Bad Ischl kaj solena fermo de la kongreso. Reveno al Linz Proksimume je la 22-a horo.
Vendredo 15/5 - Validas la Postkongresa Programo! Antaùtagmeze ekveturo de Linz per ekstra ŝipo sur la Danubo por la partoprenantoj de la PostKon.

P O S T K O N G R E S O  E N  V I E N O  Dato 15-a ĝis 18-a de majo 1958

Adreso: "I.F.E.F.-Nachkongress", Internacia Esperanto-Muzeo Wien I°Hofburg.
Kotizo: Aùstria Ŝ. 300 por ĉiuj aranĝoj laù la sube skribita programo.
Loka Postkongres-komitato (L.P.K.K.): Prezidanto: Kort. Kons. Hugo Steiner - Vicprezidanto: Jozef Zink - Kasisto: Jozef Hawla - Sekretario: Inĝ. Walter Huber - Asesoroj: Inĝ. Erich Eichinger kaj Inĝ. Wilhelm Hermann.
Limdato de la anonco: 15-a de marto 1959; Bonvolu kiel eble plej baldaù anonci vin. Car la Postkongreso okazos dum pentekosto kaj samtempe estos aliaj aranĝoj, ni devas mendi la ĉambrojn sufiĉe frue. Pri la loĝ-malfacilaĵoj ni nur povas garantii loĝeblecojn por proksimume 300 partoprenantoj.
Privataj tranoktoj: Tiuj, kiuj loĝos private ĉe amikoj, do ne bezonos tranoktejon, pagos aù Ŝ.180 (anstataù 300) por la normala aù Ŝ.240 (anstataù 400) por la daùrigata postkongreso.

PROVIZORA PROGRAMO

Vendredo 15/5 - Ekveturo per ŝipo de Linz: Detala horo sekvos. Por la tagmanĝo bonega manĝpakaĵo. Belega ŝipveturado laù la rivero Danubo tra la fama regiono Wachaù, floras dum tiu tempo la abrikotaj. Proksimume je la 19,30 h. alveno en Vieno, amika akcepto ĉe la ŝipstacio. Komuna vespermanĝo, post veturado al la diversaj noktigojoj.
Sabato 16/5 - Per aùtobusa rondveturado tra Vieno-kastelo Belvedere-kastelo Schönbrunn (vizito al la imperiestraj ĉambroj, parko, Gloriette, bela puto, Roma ruino k.t.p.) komuna tagmanĝo. Aùtobuso de Schönbrunn al la urbo kaj poste al Kahlenberg sur la fama "Höhenstrasse", restado 1 horon por ĝui la belegan perspektivon al Wien. Veturado al Wien trans Danubo al Langenzersdorf, kie ĉe bona vespermanĝo ĝuado de bona vino ĉe "Heuriger" (elverŝejo de lastjara vino), 22 h. reveturo per la samaj aùtobusoj al Vieno.

Dimanĉo 17/5 – Sankta-Meso, vizito al Internacia Esperanto-Muzeo. Poste vizito al "Imperiestraj ĉambroj" kaj eklesia kaj laika trezorejoj en Hofburg. Komuna tagmanĝo, gvidado tra la antikva Vieno kaj tra Hofburg. Komuna vespermanĝo, la cetera vespero estas libera.

Lundo 18/5 – Matene fino de la postkongreso.

Atentu: La kotizo de Ŝ. 300 estas por ĉiuj priskribitaj aranĝoj, manĝoj kaj tranoktoj ek de la forveturo per ŝipo de Linz ĝis la tranoktado de dimanĉo al lundo. La lunda matenmanĝo ne plu estas en la kotizo.

Se estas sufiĉe da interesuloj por ekskurso al Semmering, la postkongreso estos daŭrigata per jenaj aranĝoj:

Lundo 18/5 – Veturado fervoje al Semmering, 1000 m. alta, bonega tagmanĝ-pakaĵo, kiun oni povas ĝui en tiea restoracio ĉe biero, vino k.t.p. Post 4 hora travagado reveturo al Wiener-Neustadt, kie ni inaŭguros marmortabulon sur naturŝtono kun la surskribo "Esperanto-Park". Poste gvidado tra la antikva urbeto kaj kunveno ĉe amika vespero kun la tieaj esperantistoj. Komuna vespermanĝo kaj reveturo fervoje al Vieno. La partoprenontoj de tiu ekskurso devas:

a) pagi kroman kotizon de Ŝ.100, kiu enhavas ĉiujn aranĝojn de la matenmanĝo lunde ĝis la matenmanĝo marde escepte la fervojbileto.

b) mendi la liberbileton por si kaj la rabatbileton por la familianoj ne ĝis Linz, sed trans Linz kaj Vieno ĝis Semmering.

Liberbiletoj: Por la partoprenontoj de la normala Postkongreso la tien veturado finas en Linz, kaj la reveturado komencas en Vieno.

Ŝipveturado: Eksterlandaj fervojistoj el kelkaj landoj ĝuas sur Danuba ŝipo rabaton de 50 %. Eble ni atingos tiun ĝuon ankaŭ por familianoj.

## 44-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

### JUBILEA ZAMENHOFA JARO

VARSOVIO (Pollando) 1 – 8 aŭgusto 1959. Sub honora protektado de la Ministro-Prezidanto de la Pola Popola Respubliko: JOZEF CYRANKIEWICZ

### OFICIALAJ KOMUNIKOJ

N-roj 1 kaj 2 — Oktobro kaj Novembro 1958

Adreso: 44-a Universala Kongreso de Esperanto, Varsovio. Telegramoj: Esperanto-Kongreso, Warszawa. Banko: Narodowy Bank Polski, VII.O.M. n-ro 1531-9-525

Kotizoj: Ĝis fino de decembro validas jenaj kotizoj: Kongresano U.S. $ 6 Edzino U.S. $ 3 Junulo ĝis 20 jaroj kaj studentoj U.S. $ 2. Individuaj membroj de UEA rajtas rabaton de U.S. $ 1. Edzino de Individua Membro rabaton de U.S. $ 0,50.

Vizoj: La polaj aŭtoritatoj decidis, ke la kongresanoj ricevos 50 % rabaton de la kosto por enirvizoj: grupoj kaj karavanoj pagos nur 1,50 U.S. $.

Glumarkoj: La kvarkolora glumarko de la U.K., kun arta kongresa emblemo, estas aĉetebla ĉe la Landaj Asocioj, ĉe U.E.A. aŭ ĉe la Kongresa Oficejo je prezo de 0,25 usonaj dolaroj por folio de 25 pecoj.

Hotelaj prezoj: La nacia turisma entrepreno ORBIS disponigas al la kongresanoj jenajn pensionojn en hoteloj: Por persono kaj por tago: Kat. A (luksaj) US.$ 10 Kat. B US.$ 7,50 Kat. C US.$ 5,50. Universitata domo: ĉ. 20 US.$ por la tuta semajno. La prezoj inkluzivas loĝadon kaj tri kompletajn manĝojn.

Karavanoj: Anoncis karavanon: Itala Esperanto-Federacio, CG.Galilei 22 Torino S-ro S.K.Nielsen, Havepladsvej 129, Fredericia, Danlando.

Ekskurso: Unu el la Kongresaj ekskursoj vizitos Byalistok, naskiĝurbo de D-ro Zamenhof, okaze de ennasonigo de la fundamenta ŝtono por la konstruota monumento al la aŭtoro de Esperanto.

Statistiko (ĝis la fino de oktobro) Aliĝis entute 312 personoj el 28 landoj (Pasintjare 212 el 25 landoj).

G.C. Fighiera Konstanta Kongresa Sekretario

ITALAJ PIONIROJ - D-ro ACHILLE TELLINI (Daŭrigo de la pasinta numero)

Inter la multego da materialo, nun propraĵo de la Urba Biblioteko en Udine, mi trovis malgrandan not-libron en kiu Samideano Tellini verkis jenan poezion kie oni povas konstati la entuziasmon de tiu ĝentila kaj bonkora samideano/

Kial fariĝas ĉielo vespere purputa kaj ora?
Kial dumnokte briladas la miloj kaj miloj da steloj?
Kial kobradas la teron-la floroj el multaj koloroj?
Kial murmuras ventoto ĝentilajn legendojn pasiajn?
Kial leviĝas ĉielon kaj poste revenas surteron
Sento de amo plej dolĉa, ĝojiga, eterna ĉiama?
Kial? Ĉar super homaro la nova aperis anĝelo
Stelon Esperan kvinpinta sur frunto portanta fiere;
Estas ja bela la mondo, kaj vivas ankoraŭ feliĉe;
For, do, por ĉiam malamo! Foriru malpaco por ĉiam!
Falu la baroj jarcentaj kaj brilu la suno radia,
Al la homaro tutmonda faronta nur familion;
Kantu la nunaj poetoj la ĉarmon de l'amo senfina,
Kantu la dolĉajn ĥimerojn, la revojn lazurajn kaj orajn,
Ĉar Esperanto la sankta per plej ideala ligilo
Igos la homojn amikoj feliĉaj, gefratoj kontentaj!
Estas hodiaŭ la tago de l'granda miraklo mirinda!
Udine, urbo feliĉa, pri kiu tre dolĉa memoro
Kuŝas en fundo de l'koro la mia, vi gardu por ĉiam
Nian promeson solenan: ni ĵuras ke ni disvastigos
La idealon plej altan kaj sanktan de l'Majstro tre glora!
Udine, urbo feliĉa, la glasojn nun levas ni ĉiuj,
Laŭte kriante tutkore: vi vivu kaj vivu kaj vivu! Fino ZORATTI Angelo

RADIO ROMA - DISSENDOJ EN ESPERANTO - Casella Postale 320 Roma (Italujo)

DECEMBRO 1958 - 2. Tra la literaturo; 3. Kuriero de Esperanto; 5. Mondfamaj italaj aktorinoj: Eleonora Duse; 9. Novaĵo el Italujo; 10. Kuriero de Esperanto; 12. Leterkesto kaj bibliografio; 16. Nia mila jubilea dissendo; 17. Kuriero de Esperanto; 19. Italaj belartaj urboj: Messina; 23. Italaj komponistoj: Giacomo Puccini okaze de la centa datreveno de la naskiĝo; Kuriero de Esperanto; 26. Ĉu pasis Kristnasko? 30. Italaj kanzonoj en Esperanto; 31. Kuriero de Esperanto.
JANUARO 1959 - 2. Louis Braille, okaze de la 150-a datreveno de lia naskiĝo; 6. Tra literaturo; 7. Kuriero de Esperanto; 9. Leterkesto kaj bibliografio; 13. Novaĵoj el Italujo; 14. Kuriero de Esperanto; 16. Italaj verkistoj: Alessandro Manzoni; 20. Italaj kanzonoj en Esperanto; 21. Kuriero de Esperanto; 23. Mortintaj urboj/ Herculanum; 27. Universalaj geniuloj: Leonardo da Vinci; 28. Kuriero de Esperanto; 30. Italaj belartaj urboj: Bergamo.

INTERNACIA FERIO-SEMAJNO POR FERVOJISTOJ kaj ties familianoj.
Dum la plej bela somera sezono ĝi okazos. Vi ekskursos sur la JURAO (montaro), tra la altebenaĵo svisa kaj en la koron de la Berna Oberlando (juvelo de la Alpoj)
Prezo: Svisaj Fr. 75 (pagenda ĉe alveno) por pensiono kaj ekskursoj.
Organiza adreso: Hans Hunkeler, Trajnĉefo, Girixweg 31 Aarau (Svislando)

ANONCO: Belegajn bildseriojn kaj kajerojn sendus al vi pri Budapesto kontraŭ libroj gazetoj Esperantaj. Antaŭ konsento estas necesa. Adreso/ Ad. SZELESS, Sziv u. 9. I. 5. BUDAPEST VI^ (Hungarujo)
DEZIRAS KORESPONDI: MINĈO ST. STANEV "Jodor Burmov" 3 VARNA (Bulgarujo)